Rainer Maria Rilke,

Advent'

tradukita de Manfredo Ratislavo

Neĝerojn pelas en arbaro
la vintra vento antaŭ si.
Ke brilos ĝi kun kandelaro
jam antaŭsentas la abi'.

Ĝi kontraŭvente sin defendas,
etendas sin al blanka voj';
ĝi kreskas daŭre kaj atendas
nur tiun nokton de la ĝoj'.

Traduko de la Germana poemo "Advent" de RAINER MARIA RILKE *(Rajnero Mario Rilko, ∗1875-12-04 – †1926-12-29) en Esperanton de* MANFREDO RATISLAVO *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04).*

MR-020-4 / Arg-98-197 (2005-09-14 13:16:10)

MR-020-4